

---

# STARTO



---

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1974 6 (44)



Membroj de la EK Mělník ĉe la Tombo de L.L.Zamenhof  
en Varsovio, julion 1974. fotis K.Lojka

## SKIZE PRI LA 59-a UK

Ĉirkaŭ 1600 kongresanoj el kvindeko da landoj kaj 200 gastoj el Hamburgo kolektiĝis la 28an de julio en la salono Zamenhof por aŭskulti la bonvenigajn vortojn de la urbestro prof. Biallas. Partoprenis ankaŭ 12 ĉs. esperantistoj, inter ili vicprezidanto de ĈEA kaj ĉefdelegito de UEA por ĈSSR ing. F. Sviták.

Salutis la kongreson ŝtataj reprezentantoj el 18 landoj, inter ili bondeziroj en E-o adresis tri registaraj reprezentantoj. La solenaĵo finiĝis per la festparolado de prof. Lapenna, kiu, post la pritrakto de la kongresa ĉeftemo deklaris subite, ke li retiriĝas dum tiu ĉi kongreso el ĉiuj siaj funkcioj.



Inter la laborkunsidoj de UEA okazis Unua ĝenerala kunveno, kiu pritraktis i.a. laborplanon de UEA por 1973/4 kaj plifortigon de la landaj asocioj. La Dua ĝenerala kunveno okupiĝis pri "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo", ĉeftemo de la UK.

TEJO okazigis publikan debaton, kie estis substrekita la daŭra deziro aparteni kaj kunlabori al UEA. Okazis proksimume 20 kunvenoj de diversaj fakaj asocioj.

Mondpaca Esperantista Movado okazigis diskutadon kun partopreno de 70 personoj. La prezidanto N.Aleksiev informis pri la platformo aprobita de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo.

Al la kultura programo de la kongreso efike kontribuis la slovakva kvarteto Esperanto, kies membroj sukcese popularigis la slovakajn naciajn kantojn en moderna arango. Inter la gajnintoj de la Belartaj Konkursoj /branĉo:originala dramo/ troviĝas d-ro L.Izák el Martin, Slovakio.

Foriro de la ĝisnuna prezidanto de UEA el la mond-movada scenejo estis netradicia evento de la 59-a UK. Erariga estus supozo, ke ĝi estas rezulto de ajnaj personaj plaĉo aŭ malplaĉo kontraŭ prof. I. Lapenna. UEA, same kiel ĉiuj aliaj organizaĵoj, celantaj la internacian sferon, estas devigata respeguli objektivajn ŝanĝojn en la internacia vivo. Ĝi ne povas neglekti ilin, se ĝi mem ne volas esti neglektata kaj se ĝi volas labori por la internacia kompreniĝo.

Interne de UEA oni ne povas malatenti la kvantan fortigon de la asocioj el la socialismaj landoj/temas pri la kvin plej grandaj asocioj aliĝintaj al UEA/ kaj sekve ankau enradikiĝon de la novaj tendencoj en la aplikado de la internacia lingvo. La esperantistaro atendas de la nova estraro, ke ĝi respektos ilin kaj kontinuigos la p o z i t i v a j n atingojn de la antaŭa. /kni/

/Detaloj pri la ŝanĝoj en la UEA-estraro en la artikolo sur la 3-a paĝo/.

## Omage al la eventoplenaj tagoj...

La sepan esperantistan renkontiĝon en Mělník /19.-20.10.74/ omage al la 30a datreveno de la Slovaka Nacia Revolucio kaj okaze de la 700jara jubileo de la urbo arangas Pacdefenda Esp.Rondeto sub la auspicio de la Distrikta Packonsilantaro, Urba Komitato, ĈEA kaj AE SSR. La programo inkluzivas i.a. ekskurson al Říp, kulturen programon kun la kvarteto Esperanto kaj la junularan kunsidon.

En la slovaka banloko Dudince okazis la tradicia esperantista renkontiĝo /6.-8.9/, dum kiu kunsidis la CK de AE SSR kaj la Regiona Komitato por Esperanto.

---

Fine aperis la longe atendita sciencfikcia novelaro de la konata ĉeĥa verkisto Josef Nesvada

## La perdita vizaĝo

EN ESPERANTO

Kolekton de dek streĉaj rakontoj kun ilustraĵoj eldonis Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La tradukon de A.Staňura reviziis E.Felix kaj O.Kučichal. Eldonkvanto 5000 ekz., prezo 15 Kčs. Mendu tuj ĉe la asocio.

---



# SEN ABSCESOJ

Estas sufiĉe konata la fakto, ke en la estraro kaj komitato de UEA en la du pasintaj jaroj multigis akraj konfliktoj kaj kvereloj, ĉefe inter I.Lapenna kaj pluraj liaj oponentoj. Leginte kelkajn disput-artikolojn, en kiuj oni uzis vortojn mensogajn, kalumniajn, mi ĉiam tre bedaŭris, ke tio ĉi okazas en la Esperanto movado. Kaj malgraŭ tio mi admiris la gigantan energion, la laborkapablon de I. Lapenna, liajn kontaktojn en la sciencaj rondoj kaj nerefuteblajn meritojn pri la prestiĝa stato de la Esperanto-movado en la hodiaŭa mondsocio. Mi eĉ opiniis, ke la ioma "diktatoreco", ofte riproĉata al li, estas necesa por teni UEA laborkapabla.

Veninte al la lasta kongreso mi konstatis, ke jam antaŭe - kaj tio evidentiĝis dum la komitata kunveno la 27an de julio - kreiĝis en la Komitato de UEA opozicia, ĉirkaŭ dutriona plimulto, konsistanta el bloko de okcidentaj landoj kun Britio surfrunte kaj de la socialismaj landoj. Sekve de tio estis dum la elektoj de komitatanoj C elektitaj el 28 kandidatoj nur 13, kiuj estis proponitaj de tiu ĉi opozicia bloko.

La rezulto estis, ke prof.Lapenna en la fino de sia kongresa parolado, la 28an de julio, proklamis, ke li rezignas ĉiujn funkciojn en UEA. Li profitis la forumon de la solena inaŭguro por unuflanka argumentado sindefende, uzante akrajn vortojn por kondamni la kontraŭulojn. Same li faris okaze de la Dua Ĝenerala Kunveno de UEA kaj de la Komitato, kiujn li ankoraŭ gvidis. Li eĉ atakis landajn asociojn, kiuj antaŭ la skribaj elektoj de komitatanoj B instrukiis aparte sialandajn delegitojn.

En la dua komitata kunveno I.Lapenna kaj liaj partianoj lanĉis ampleksan atakon kontraŭ la estrarano pri financoj, J.Woessink, kiu insistis, ke estu klarigitaj malkorektaĵoj en la financoj de la beograda kongreso. Post preskaŭ tuŝtaga kverelado kaj manipulado la Komitato rifuzis la atakojn kontraŭ Woessink kaj decidis, ke la afero estu pritraktita nur post fundaj esploroj.

Kiam la kongresa elekto-komisiono, gvidata de N.Aleksiev, vizitis prof. Lapenna kun la propono, ke li kandidatiĝu kiel honora prezidanto de UEA, prof. Lapenna post unuhora diskuto strikte rifuzis tiun ĉi proponon, ripetante sian proklamon en la aprila n-ro de Esperanto: "...au oni deziras havi Lapenna sen abscesoj en la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi".

En la komitata kunveno gvidata de prof. Lapenna la 2an de aŭgusto la elektokomisiono prezentis nur unu kandidatliston de la UEA-estraro en jena konsisto, aprobata per dutriona plimulto de la voĉdonantoj :

prezidanto	d-ro H.Tonkin, Usono
vicprezidantoj	d-ro W.Bormann,FRG
	prof.C.Stop-Bowitz,Norvegio
ĝen.sekretario	E.L.M.Wensing, Nederlando
estraranoj	d-ro P.Denoël, Belgio
	d-rino F.Szabó-Felső, Hungario
	S.Swistak, Pollando
	E.J.Woessink, Nederlando

Trudas sin la demando, ĉu pravas I.Lapenna aŭ la grandparto de la Komitato ? UEA havas de la novan estraron laŭ la Statuto laŭregule elektitan, kaj sen prof. Lapenna, kiu dum la kongresaj aranĝoj elstarigis sian personecan kulton. La fakto, ke li, malgajninte la lukton pri la privilegia funkcio en UEA, ofendiĝis kaj rompis ĉiujn rilatojn kun la nova komitato, verŝajne ne donos favoran impreson pri lia persono kaj ne servos al lia digno antaŭ la vasta esperantista publiko.

F. Sviták



## SUKCESAJ FILATELISTOJ

Dum la tagoj 8.-23.6.okazis en Brno la Tutŝtata ekspozicio de poŝtmarkoj "Brno 74". La jam konataj kolektoj de ĉeĥaj filatelistoj-esperantistoj D.Bartošik kaj V.Hasala ricevis po granda arĝenta medalo kaj honorpremio de la jurio. En la literatura branĉo de la ekspozicio prezentis la Esperanta sekcio de Federacio de ĉs. filatelistoj sian organon "Zpravodaj", kiu estis premiita per granda bronza medalo.

Okaze de la ekspozicio emisiis la ĉs. federa ministerio de telekomunikoj serion de ses koloraj UTK kun ilustraĵoj de aviadilo, ĉrkaŭ kiu estas tekstoj en la ĉeĥa, slovaka, angla, franca, germana kaj rusa lingvoj. Sur la pliaj dukovertoj estas kiel la dua lingvo Esperanto. La emisio de tiuj ĉi novaj tutajoj kun E-o signifas ĝian oficialan rekonon flanke de la plej alta poŝta instanco en ĈSSR.

Al la Internacia ekspozicio de poŝtmarkoj "Opava 1974" /6.-8.9/ aliĝis i.a. 6 Esp.kolektoj, ankaŭ el eksterlando. Ĝis nun nenie oni povis vidi samtempe tiom da kolektoj je la temo Esperanto. Pri la sama temo oni povas legi du artikolojn en la ekspozicia katalogo. La Esp. sekcio de FĈSF aranĝis en Opava okazan renkontiĝon. espo/faba

## Teknikistoj raportas

Kiel informas bulteno de TS ĈEA en la Esplorinstituto de kemi-industriaj ekipaĵoj en Brno, kunlabore kun ties filio de la ĉeĥa Scienc-Teknika Societo /VTS/, okazigis la membroj de Teknika sekcio de ĈEA ing. J.Vojáček kaj ing. J.Werner la publikan informan kunvidon pri E-o en tekniko k scienco. Aldone estis projekciataj du filmoj pri FIAT.

Matematika vortaro Esperanta - -angla-ĉeĥa-franca-germana-polarusa estas kompilata sub la gvidado de ties iniciatinto W.E. Klimmek el Pollando. La ĉeĥan version ellaboras ing. J.Werner, dr.

J.Švejda, ing.V.Němec kaj ing.V. Drobny.

**PUBLIKE PRI ESPERANTO.** La revuo de Tutsovetia Centra Konsilantaro de Sindikatoj "Tekniko kaj scienco, eldonata en 200 mil ekz. ensiamaja n-ro aperigis dupaĝan intervjuon kun profesoroj M. Isajev kaj D.Armand "Esperanto - ĉu la lingvo de estonteco?"

## PRI ĴUDO EN I.L.

Ing. J. Novák CSc, sportulo laboranta sur la kampo de ĵudo, karateo ks. pretigas surbaze de sia libro "Kapitoly o sebeobraně"/Ri sindefendo/ novan kompletigitan eldonon jam en Lingvo Internacia. La aŭtoro nome trovis, ke la neevitebla kreado de la fakaj terminoj estas multe pli facile kaj klare realigebla en E-o ol en la ĉeĥa, ĉar oni derivas la vortojn rekte laŭ la mekanika funkcio de la nocio, tiel ke la vorto mem fariĝas instruilo.

La libro enhavas krom multaj instruaj bildoj ankaŭ sufiĉe ampleksan fakajn terminojn kun precizaj difinoj.

/ Fx/

## EL S.E.T. LANĈOV

124 kursanoj kaj 18 instruistoj partoprenis en la 2-a etapo de SET Lanĉov 1974. Oni instruis en la A-C kursoj, krome okazis la "naciaj" kursoj: bulgara, hungara kaj jugoslava. Inter la aliaj eksterlandaj vizitintoj estis kvar esperantistoj el Italio, du el Aŭstrio kaj po unu el Sovetio kaj GDR. Fine de la etapo vizitis la tendaron prezidanto kaj sekretario de ĈEA J.Vítek kaj Z.Křimský.

AL LA II-a ESPERANTA BALO EN OSTRAVA /18.1.1975/ invitas ĉiujn esperantistojn LG ĈEA. Adr.: Místní skupina ĈES /VŽKG/, p.s.55 703 00 Ostrava 3.



## Pri unu malsano

"Kiu en nia Esperantujo rajtas nomi sin neamatoro?" demandis nia leganto. Kaj li asertas, ke ankoraŭ neniu institucio proklamis iun - doktoro pri Esperanto ...

Kiel do difini la amatorismon? Ĉu per lingvaj nescio aŭ mallerto? Tiuj ĉi prezentas nur eron, tute malgravan, de la problemo. La lingvo internacia estas antaŭ ĉio instrumento, kiun oni povas kaj devas apliki en ajnaj agado aŭ fako. Kaj la agantoj devus esti fakuloj! Jen la principo, bedaŭrinde nur sporade observata far adeptoj de la IL. Tio grave damaĝas la lingvon mem, ĝian fakan evoluon kaj entute la rolon, por kiu ĝi estis kreita.

Oni ja estas profitemaj kaj ne multaj ŝatas lerni Esperanton nur pro ĝia facileco. Estas nature, se specialisto pliprofundigas sian konon rilate la fakterminaron en E-o kaj utiligas ĝin por penetrigi la lingvon kaj samtempe por progresigi la sciencan informadon. Aliflanke la hobiaĉa starpunkto naskas amatorismon, diletantismon. Estas kutime, ke ekz. ĉarpentisto sin proklamas fakulo pri politiko, kiel konstatis siatempe T. Sekelj, konsultinte la Jarlibron. En "Esperantujo" pluraj konsideras sin tradukistoj, verkistoj aŭ lingvistoj, ofte apenaŭ komprenante la gramatikon de sia gepatra lingvo, oni facilanime intervenas ekster siaj fakaj kompetentoj, la Esperantaj publikaĵoj svarmas je diversaj "poemoj", "recenzoj", gravmienaĵaj pripensoj feble argumentitaj. Eĉ perfekta konanto pri Esperanto povas amatori, se li "traktas" per tiu sama lingvo temon, kiu superas liajn scipovon kaj kapablon.

En Esperanto kaj per ĝi oni ofte furorigas balaston, kiu neniam povus akceptiĝi sur la alia lingvo-tereno. Ĉu malfacile klarigi, kial la publika opinio kutimas rigardi Esperanton ofte kiel ian "hobion"?

La amatorismo, diletantismo estas malsanoj, similaj al sekteco. Ankaŭ la popola saĝo avertas: Restu, tajloro, ĉe via laboro. Kaj tio estus la plej efika rimedo kiel preventi tiun ĉi infekton.

O. Knichal

## MISKOMPRENO EN LA KOSMO-NEDEZIRATA

Sub tiu titolo aperis en Rudé /31.7./ artikolo de la presagentejo "Novosti". Ĝi citas la vortojn de gen. Stafford - kiu bilancas la komunan trejnadon de la sovetiaj kosmonaŭtoj kaj de la usonaj astronautoj - ke krom la lingvaj baroj oni renkontis neniujn aliajn obstaklojn.

De la komunikado nome dependas la sekureco de ambau spaco-ŝipoj kaj de iliaj loĝantoj dum la reciproka konekto en la kosmo. Tial ambau grupoj parolos la lingvon de siaj kolegoj; la sovetoj la anglan kaj la usonanoj la rusan, ĉar, kiel konstatas la artikolo, eĉ malpli korekta elparolo de la gepatra lingvo estas pli komprenebla ol rapida parolo en la fremda.

Jen la denova pruvo pri la paradoksa malakordo inter la evolu-

inta tekniko kaj malevoluintaj homaj interrilatoj. Ĉar ĉu ne multe pli facila kaj komprenebla estas la konversacio en la IL? Tamen ne sufiĉas nur konstati. La kosma sperto estu precipe instigo por fakuloj, ke ili per konkretaj agoj klopodu progresigi Esperanton ankaŭ en la dulingva "spaco-lando"! /kni/

## SALUTO EL RIGO

Nia redkacio ricevis la 20an de aŭg. tiun ĉi leteron el Rigo:

Partoprenantoj de la XV. Baltlanda Esp. Tendaro sendas al Vi kiel al la legantoj de STARTO elkorajn salutojn kaj bondezirojn. La tendaron partoprenis 120 personoj el 5 respublikoj. Okazis prelegoj, seminario, ekspozicio de pentraĵoj.. Sekvas pli ol 40 subskriboj.



## SUPER LA TOMBO DE L' AMIK'

/adiaŭe al profesoro V. Scheiber /

Viciĝas ĉerkoj, ĉerk' post ĉerk',  
je l' vic' nun venis ĉerko via.  
Finita estas homa verk',  
sub uragan' rompiĝas kverk',  
restas ĉe l' fin' elvoj'nenia.

Amiko, plu en rememor'  
de nia menso lumos helo  
pri nobla hom' kaj brava kor',  
muzikfakul' pasinta for,  
la regalint' per sona belo.

Per nia lingvo kaj muzik'  
jardekojn ravon vi disdonis.  
Ne forgesblas la ĝuig',  
koncertoj kies artefik'  
la klubagadajn jarojn kronis.

Operkantistoj de renom'  
en via tonfestar' ne mankis ;  
nun laste jam al bona hom'  
por tiu riĉ, por tiu don'  
kun trista kor' ni venas danki.

Jiří Kořínek  
7.8.1974

La 2an de aŭgusto mortis Vilibald Scheiber, en aĝo 69 jarojn, profesoro de Konservatorio en Brno kaj longjara membro de la Stata Teatro en Brno, honora membro de ĈEA kaj de EK Brno.

Prof. Scheiber famiĝis kiel pedagogo, harpisto, kapelestro kaj komponisto. Kiel arda esperantisto li firme kredis, ke per la IL oni povas atingi harmonion inter la popoloj. En sia funkcio de konservatoria profesoro li preparis pli ol 50 koncert-vesperojn kaj tradukigis ĉ. 300 oper-ariojn kaj kantojn de la en-kaj eksterlanda kreado. Liaj profesiaj kolegoj promesis aranĝi ankaŭ estonte la ĉiujaran koncerton honore al L. L. Zamenhof. Tio estas ilia esprimo de estimo al la forpasinto.

T. KILIAN 80 jara

La nomo de Theodor Kilian /nask. 26.9.1894/, emerita direktoro de sanitara liceo, aparten-

as al la plej popularaj en la ĉs. movado, ĉar ĝia portanto estas renoma aŭtoro de la Esperanto - lernolibro por ĉeĝoj, el kiu ĉerpis la konon pri la IL jam preskaŭ 100 mil personoj. Precipe al la tendaranoj, en kies rondo li pasigis multajn tagojn, instruante kaj prelegante, T. Kilian dediĉis sian malgrandan "ABC de la internacia lingvo", 808 vortoj en Esperanto" kaj legolibron "LMR". De la sama aŭtoro estas ankaŭ vico da populariĝaj publikaĵoj pri E-o en la ĉeĝa kiel ekz. "Esperanto a jeho tvůrce" /Esperanto kaj ĝia kreinto/.

T. Kilian, komitatano de la iama EA ĈSR, estis kuniniciatinto de la konata Verda Stacio, por kiuli tradukis la dramon de K. Čapek "La Blanka Malsano". Li utiligu ankoraŭ longe siajn nekontestebajn pedagogiajn spertojn kaj talenton. /k/

OMĀĜE AL M. JAKUBCOVÁ. Unu el la lastaj kunvenoj de la Riga Esperanto-Klubo estis dediĉita al la 75-jariĝo de la Esp. poetino Milda Jakubcová. Pri ŝiaj vivo kaj verko prelegis M. Burgmeister, originalajn kaj tradukitajn versaĵojn de la jubileantino laŭtlegis E. Lippe.

M. Jakubcová, laŭdevene latvino vivanta en ĈSSR, multe kontribuis al la popularigo de la latva poezio eksterlande.

La 16an de aŭgusto atingis 70 jarojn la rondeta prezidanto en Most, konata esperantisto, d-ro Josef Černý, kuracisto aktiva sur diversaj kampoj de la Esperanta vivo. Li estas spirita patro de la ĉs. medicinistoj-esperantistoj, nelacigebla pedagogo kaj tradukanto.

Mortis en Most Josef Hříbal /nask. 1909/fervoĵisto, esperantisto dum 40 jaroj.

Post mallonga malsano forpasis la 23an de julio en Poděbrady L. Pytlounová, aĝa 71 jarojn.

Komence de aŭgusto 75-jariĝis



## Diskuto, opinioj

### ĈU 'PRAHA' AŬ 'PRAGO'?

Kiel konate UNO, UNESCO kaj la internaciaj komunikaj kontraktoj ktp. uzas la nacilingvajn nomojn de urboj laŭ la oficiala ortografio de koncernaj landoj. Ankaŭ UEA sekvas tiun ĉi principon /vidu la revuon Esperanto, la CED-dokumentojn k.a./

La nomo Praha estas bone konata kaj vaste uzata en la Esperanto-movado. La ĉeĥa versio estas bone prononcebla preskaŭ por ĉiulingvanoj. Tion pruvas multnombraj diversnaciaj vizitantoj de niaj EK. Kaj la ĉs. institucioj agnoskas oficiale kaj uzas en la interŝtataj kontraktoj kaj internaciaj kontaktoj nur la nacian nomon Praha. Ni kiel publika organizaĵo devus sekvi tiun ĉi ekzemplon.

Male, la nomo Prago estis agnoskita nek kiel nomo de la kongresurbo de la 13-a UK en Praha, nek iam pli poste oficialigita de la Akademio. Estas konata la konsilo de Zamenhof, ke "komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon ol seka teoria logik-eco!"

Kial do ni, ĉs. esperantistoj, estu tiurilate sektecaj, ne respektante la internacian kaj la ĉs. oficialan uzadon kaj entrudu la formon Prago, kiu verŝajne al la plejmulto de la enlandaj esperantistoj ne konvenas? Mi dubas pri tio, ke per enkonduko de "Prago" en Esperanton nia ĉefurbo fariĝos pli internacia. Ĝi eble kaŭzus nur kaoson en la praktika uzado de la urbonomo kaj miskomprenojn eksterlande, ĉu ne temas pri la du malsamaj urboj...

La unusolan malhelpon de la nomo Praha, t.e. la adjektivan finaĵon la esperantistoj scias ĝenerale eviti. Al verkistoj kaj tradukistoj estu permesite libere uzadi "praga" aŭ "Prago". Cetere, ĉu ili ne emus kune kun la filologoj interkonsenti por la adjektiva formo alian solvon ol la simplan uzon de la latina radikoj prag-?

F.Sviták

---

Alcis P e t r en Litvínov.

Gratulon al Marie P o l á š -  
k o v á, sekr. de EK Vsetín kaj J.  
K l i m e n t, kiuj geedziĝis la  
17an de aŭgusto.

Salutoj el internacia arkeolo-  
gia laborbrigado en Kaliakro, Bul-  
gario, venis de nia membro J. Hin-  
čica.

Forpasis en Hradec Králové Jo-  
sef E i s e n r e i ch aĝa 70 j.

---

ANSTATAŬ...la kutima rubriko  
Rondeta vivo aperas nur riproĉa  
rimarkigo. Ĉar neniu novajoj ven-  
nis. Ĉar antaŭe oni nature devus  
ion fari. Ofte aŭdeblas: nenio  
interesa por legi. Eble sensacion  
oni sopiras. Jes, sed de kie ĝin  
preni, se oni ne agas, ne elpens-  
as? Kaj tamen/kia miro!/ni viv-  
as - kaj sanas! /k/

KUBA ESPERANTO-ASOCIO fondiĝis  
la 17an de aŭgusto 74, en Havano.  
Ĝia prezidanto fariĝis O. Otero.  
La estraro de ĈEA sendis salut-  
leteron.

SOLVO DE LA KRUCENIGMOJ: Al  
kuko kaj kaso ĉiam venas amaso -  
/2/74/, Restu tajloro ĉe via la-  
boro /3-4/ kaj Libro de apokrif-  
oj /n-ro 5/.

Sekretariát svazu obdržel něko-  
lik knižních novinek ze zahrani-  
čí /Rozmówki esperanckie od A. Pe-  
tyna za 10 Kčs a Nova teatro od  
E. Lapennové za 18 Kčs/.

VEŠKEROU KORESPONDENCI týkající  
cí se spolupráce EK s Jazykovou  
komisí zasílejte Z. Matykové, Ge-  
bauerova 1065 500 02 Hr. Králové.



# Korespondenční deska

SOVETIO - L.Kuznecova, Tichvin 64, Mikrorajon 5/5, Leningradská obl. o N. Kozlova 344034, Rostov-Don, do vostr. o V. Dubrov 29j. abon. j. 101, Krasnodar, 350 000 o K. Miller, Hiiv 29-2, Tallinn, Estonio o V. Olšauskas 29j. Puškinio 21-15, 234520, Litovio o A. Suško 16j.

Tajkos pr. 10-49 Klajpeda, Litovio o M. Markov 25j. bulgaro, Lazareva 19, d. 5, Gubkin 9, Belgorodská obl. o Ullar Luga, Snurtuki, 25, 200 016, Tallinn, Estonio

P O L L A N D O - H. Smiechowska 18j., Cierpice, pow. Toruń o L. Krawiec 14j. Stolno, pow. Chelmo, woj. bydg. o A. Zurawska 16j. Lulkowo, pow. Toruń o W. Galek 16j. Grebocin-Osiedle, pow. Toruń o R. Kurpiewska 16j., Grebocin, pow. Toruń o D. Stepaniak 13j. Piekary 43m 6, Toruń o T. Pawlowski 14j. Wiazova 4m 2 Toruń o Z. Kalata 16j. Konin 2, 42-240 Rudniki Czestochowskie o G. Kisiel 16j. Os. Redziny k Czestochowej, ul. Broniewskiego 3/22, pow. Redziny, Katowice o E. Skornik, oficistino, Legnica, str. Roosewelta 39/3 o Membroj de Hobby-Club Esperanto, Pupik "Ruch", Katowice, Gliwicka 42.

B U L G A R I O - R. J. Marinova, Kubrat 3, vh. A, et. 3, ap. 5, Šumen o B. Copev, Stara Planina 19, Svištov o P. P. Petrov, Valko K. Kabanivan 10 A, Čirpan.

R U M A N I O - Bögözi C. 17j., Odorheiu-Secuiesc, str. Lenin 6, bl. A 3, ap. 15 o Oltyán L. 17j. Odorheiu-Secuiesc, Insulei, bl. D-3, ap. 4 o Aranka B. 23j. ofic. Odorheiu-Secuiesc, str. Rakoczi 34 o S. Czoma 16j., Odorheiu-Secuiesc, B-dul 1 Mai 18 o Nagy J. stv. M. Kogalniceanu, 4 ap. 12, Odorheiu-Secuiesc, čiu j el Jud. Hargita.

G D R - H. Kreische, 88 Zittau, str. d. Roten Armee 16b o AG Esperanto-grupo 798 Finsterwalde, Kulturbund, Schloss /dr. G. Brosche/.

H U N G A R I O - Somogyi Z. 1035 Budapest III., Vörösvári u. 21 V. 15 o J. O. Rajnai 21j. soldato kun 19j. čeňa fraulino, Internacia Poštoficeja Kesto 29-a, H-2045, Torokbalinto o F. Zsikai 14j, 6723 Szeged-Tarján, 604 A VII. 19

Č S S R - V. Hasala 23j., CS-696 11 Mutěnice 687, Esp. filatelajojn k insignojn, acetos "HdE" - 1970-71 o H. Coufalová 403 35 Libouchec 258, okr. Liberec. L. Miklecová, Bogorodická bl. VI/5, 984 01 /teknikistino/ kun gejunuloj.

Po téměř šestileté existenci Českého esperantského svazu se u nás najdou "esperantisté" pišící bývalému Čs. esperantskému výboru nebo upravující název svazu dle vlastního gusta: "Český Esperanto svaz", "Svaz českých esperantistů" ap. Průkopníkem nových názvů se nabízejí další možnosti: "Český esperantský svaz" nebo "Svaz českých aspirantů", což není vzácné u pisatelů o esperantu takřka neinformovaných. Raději by se však měli zamyslet nad důležitým a správným používáním názvů, pojmů a všeho, co nějak souvisí s hnutím a se správnou informací o esperantu! /kni/

S T A R T O - eldonas ĈEA, Jilská 10, 110 00 Praha 1, aperas 8-foje jare. Respondeca redaktoro O. Kníchal. Red. komitato: E. Felix, J. Mařík, F. Sviták. - Dohlédací pošta Praha 07, snížený pošt. platek povolen ŘP Praha j. z. P/1-2283/1971. Toto číslo bylo předáno tiskárně 23. září 1974.

ST - 17 - 6685/74